

La Riverego

Prezidanta raporto	2	Viktorio vizitinda !	18
UK-2017 : ĉu en Montrealo ?	3	Vojaĝo al Nagasako	21
Venu sciuri en Montrealo !	6	AMO-seminario en Kanado	30
KER-ekzameniĝu !	11	Amu Poznanon	33
Turismaj kaj esperantumi	15	Kristnaskaj rakontoj	35




Venu sciuri en Montrealo !

Venez écureuiller à Montréal !

Kio gravas estas tio, kio okazos !

Raporto de la prezidanto de ESK por 2013-2014



En 2013-2014 ni ĝuis niajn du jarajn renkontiĝojn: jen plian sukcesegan MEKARO-n, ĉi-foje en Ŝerbruko (foto 1) kaj ARE-n en Silvero. Ni neĝoŝuis, kaj ni manĝis bongustaĵojn kun acersiropo en sukerkabano (foto 2). Ni eldonis jen plian belegan libron : *Kristnaskaj Rakontoj* (bildo 3) kaj ni bonvenigis gastojn (foto 4 : Anna kaj Larry Bennett el Usono rakontas pri sia vivo en rul-domo vojaĝante tra Nord-Ameriko). Krome, ni ridis, babilis, denove ridis, seriozis, malseriozis... Unuvorte, ni esperantumis ! — Red.

Mia raporto estos simpla.

Dum la pasinta jaro la estraro estris, la sekretario skribis kaj nombris la membrojn, la kasisto kalkulis, la konsilantoj konsilis, la redaktorino redaktis, la membroj kunvenis, kunmanĝis, kunbabilis kaj la prezidanto prezidis kaj verkis sian raporton.

Normando Fleury

P.S. : Fakte tio, kio gravas estas tio, kio okazos. Nu, tio ankaŭ dependas de vi. Danke aŭ maldanke al Joel Amis, nun ni scios, pri kio okupiĝi en la venontaj tri jaroj se UEA akceptos la inviton kongresi en Montrealo. Tio estas belega defio kaj samtempe timiga taskego. Ni sukcesos, nur se multaj homoj pretas harmonie kunlabori je la sama celo : okazigi bonegan kongreson laŭ nia stilo. Gravas, ke ni havu plezuron farante tion.

Mesaĝo de la « kulpanto » :
**« ...la Esperantaj dioj vokis iun frenezulon diri « jes » !
Tiu « frenezulo » estis mi... »**

Joel Amis

Joel Amis, le co-auteur de l'idée d'inviter le congrès mondial d'espéranto à Montréal, fait son « mea culpa »... Et invite tout le monde à partager sa folie !

Do, vi jam nun aŭdis, ke Montrealo estas kandidato por gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto en 2017.

Tamen, vi certe scivolas kiel ĝuste tio okazis. Nu, kiel diris ESK-prezidanto Normando Fleury en sia jarraporto, pri tio « kulpas » ĉefe mi...

La ideo inviti UK-on al Montrealo cirkulas de kelkaj jaroj — ja sensurprize, ĉar,



La kunkulpantoj : Orlando Raola (maldekstre), kiu proponis kongresi en Montrealo ; Joel Amis (dekstre), kiu konsentis estri LKK-on ; neidentigebla mitologia estaĵo (apud Joel), kiu eble influis la aferon ; Esperantaj dioj : nevideblaj

kun forta loka movado, agrabla urba etoso kaj riĉa, diverseca kulturo, Montrealo estas ideala



urbo por gastigi la plej grandan kaj gravan eventon en la Esperanta mondo. Sed, pli specife, la ideon naskis la prezidanto de Esperanto-USA Orlando Raola : li de jaroj revis inviti UK-on al Norda Ameriko (originale al Usono, sed poste

la ideo larĝiĝis por inkluzivi Kanadon), kie ne okazis UK ekde la vankuvera kongreso en 1984. Tamen, eventuala usona UK montriĝis malfacila pro la viza politiko de Usono kaj ne tuj evidenta kandidat-urbo (ĉu pro manko de lokaj Esperantaj homfortoj, ĉu pro altaj kostoj, ktp). Orlando do turnis sin al Montrealo, urbo kun aktiva esperantistaro kaj firma sperto pri kongresorganizado (Internacia Junulara Kongreso en 1992, Nord-Amerika Kongreso en 1998 kaj Tut-Amerika Kongreso en 2008), kiu krome estas facile atingebla kaj de la cetera Nord-Ameriko kaj de Eŭropo. Sed, en tiu momento oni ne pretis... alivorte, neniu pretis akcepti la (pezan !) taskon de eventuala prezidanto de Loka Kongresa Komitato... Tamen la ideo pri UK en Montrealo rifuzis morti, kaj ĉi-somere la (verdaj) steloj ĝuste viciĝis kaj, dum la komuna Uson-Kanada Kongreso de Esperanto en Viktorio, la Esperantaj dioj vokis iun frenezulon diri « jes » ! Tiu « frenezulo » estis mi...

Tamen ekde la momento, kiam la (dubinda) honoro de eventuala LKK-prezidanteco kuŝis sur mia kapo, la entuziasmo por montreala UK vere eksplodis ! Jam dum la UK en Bonaero, je la granda surprizo de multaj, ni sukcesis disdoni



reklamilon pri nia plano inviti UK-on al Montrealo en 2017 (vidu la sekvan paĝon).

Montrealo tamen ne estas la sola kandidaturbo por 2017 — ni konkuras kun la urbo Seulo, Suda Koreio. Aliflanke, ni taksas la ŝancojn por Montrealo ne malbonaj — ja okazis jam unufoje UK en Seulo (en 1994 — neniam okazis UK en Montrealo), kaj ekde la lasta UK en Nord-Ameriko (en 1984) okazis kvin UK-oj en orienta Azio (1986 — Pekino, 1994 — Seulo, 2004 — Pekino, 2007 — Jokohamo, 2012 — Hanojo).

Kiel nun statas la projekto ? Nun ESK-prezidanto Normando Fleury kaj mi kunlaboras kun la tre entuziasma kaj helpema oficejo de turismo de la urbo Montrealo por kunmeti formalan kandidatiĝ-dosieron pri la kongreso por submeti al UEA. La estraro de UEA devos findecidi la aferon ĝis la UK en Lillo en 2015.

Se ĉi tiu propono sukcesos, ni bezonos la kunlaboron de esperantistoj ne nur de Kebekio, kaj eĉ ne nur de la tuta Kanado, sed de la tuta Norda Ameriko. Ni kunlaboru por bela, sukcesega UK en Montrealo — ni montru al la mondo, kion nordamerikaj esperantistoj povas fari komune !

Kial UK en Montrealo?

Forta loka movado, kun granda sperto pri kongresa organizado (IJK 1992, Nord-Amerika Kongreso 1998, Tut-Amerika Kongreso 2008)



Sed... UK neniam okazis en Montrealo...



Multegaj someraj festivaloj – E-artistoj povos aperi en ne-Esperantaj eventoj!



Facile atingebla de ĉie en la mondo



Ideala urbo por kongresoj! La urba kongresoficejo jam proponis al ni inviti UK-on al Montrealo kaj pretas helpi pri la organizado.



Milda somera vetero



Kulture kaj lingve interesa urbo, kie la lingva demando estas parto de la ĉiutaga vivo



Malmultekosta kompare kun aliaj urboj en Nord-Ameriko kaj Okcidenta Eŭropo!



Plej ĉarmaj sciuroj en la tuta mondo! (ne kredas? demandu montrealanojn!)

Kial en 2017?

Esperantistoj el la tuta mondo...
Kunfestu kun kanadanoj!



2017 estas la 150-a datreveno de Kanado



2017 estas la 375-a datreveno de Montrealo.

1984:

Kiam UK okazis en Kanado (Vankuvero) la unuan (kaj, ĝis nun, lastan) fojon! Ankaŭ, cetere, la lastan fojon kiam okazis UK en kontinenta Nord-Ameriko...



Kiam UK okazis la unuan (kaj, ĝis nun, lastan) fojon en la orienta flanko de kontinenta Nord-Ameriko: en Vaŝingtono (Zamenhof mem partoprenis ĝin)!

Tri organizoj – unu teamo!

La kongreson kunorganigos Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio, kaj Esperanto-USA.



Ĝis la revido en Montrealo en 2017!



Venu sciuri* en Montrealo !

Ĵenja Amis



Montréal invite le 102ème Congrès Mondial d'Espéranto (UK) 2017.

*sciuri: verbo inventita por la IJK en Montrealo en 1992.

« Mi volas montri nian belan urbon al esperantistoj el la tuta mondo. Estas ja tiom bedaŭrinde, ke samideanoj neniam havis la okazon viziti Montrealon por la UK! », - diras Suzano Roy, estrarano de Esperanto-Societo Kebekia, dum la lasta estrarkunveno. Ŝi lernis Esperanton antaŭ sufiĉe longe kaj jam partoprenis UK-on en Eŭropo — tamen, neniam en Nord-Ameriko, ĉar simple ne okazis UK en nia regiono ekde ŝia esperantistiĝo... La estrarkunveno celis voĉdoni pri subteno al la komuna propono de Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA (la propono, kompreneble, ricevis unuaniman aprobon), kaj ial tute spontane la kunsido fariĝis la unua plankunveno de la evento : antaŭ- aŭ post-kongreso en Otavo ? En Kebeko ? Aŭ Toronto kun vizito al Niagaraj akvofaloj ? Aŭ eble ni antaŭkongresu en Usono — kio pri Novjorko aŭ Bostono ? « Kio pri antaŭkongreso en Montrealo

mem ? Montrealo estas unu el la plej belaj kaj interesaj urboj en la tuta Nord-Ameriko ! » Sekvas vigla diskuto pri ĉiuj vizitindaj lokoj en Montrealo, kiujn ni montros al niaj Esperantaj gastoj. La listo longas, pro tio mi limigos ĝin al nur kelkaj kialoj konsideri Montrealon kiel gastigurbon por la UK.

Komforta urbo

« Montrealo ne estas simple bela — ĝi ankaŭ estas treege komforta », diris mia patrino vizitinte Montrealon la unuan fojon ĉi-jare, kaj mi ne povus konsenti pli. Por niaj eksterkanadaj legantoj mi rememorigu, ke Montrealo estas la due plej granda urbo en Kanado — ĝi situas en la provinco Kebekio, ĉe la orienta flanko, kaj ĝi havas ĉirkaŭ 1,6 milionojn da loĝantoj : perfekta kvanto por havi ĉiujn avantaĝojn de granda urbo, kun bonega transporto kaj amaso da kulturaj okazaĵoj, sed tamen trankvila, sen la hastema kaoso de pli

grandaj urbegoj. Montrealo situas sur enorma insulo en la rivero Sankta Laŭrenco, kiu difinas la Montrealajn geografion kaj karakteron. La montrealanoj, fakte, neniam nomas la riveron laŭ ĝia nomo : por ili ĝi estas simple la Riverego (la nomo, kiun portas ankaŭ nia bulteno), kaj ili ŝatas promeni aŭ bicikli laŭ la riverego. La urbo estas pura kaj verda (ne nur laŭ Esperanta senco) dank' al ĝiaj multaj parkoj, kaj kun agrabla temperaturo somere.

Montrealo estas komforta ne nur por siaj loĝantoj kaj turistoj, sed ankaŭ por la kongresantoj. Fakte, la Internacia Asocio de Kongresoj (ICCA) nomas ĝin la unua urbo en Nord-Ameriko por internaciaj kunvenoj, kaj ĝia fama multkolora Kongresa Palaco (Palais des Congrès) eĉ aperas en la gvidlibro de Mark Irving pri arkitekturaj majstroverkoj « 1001 konstruaĵoj videndaj antaŭ via morto ». Estas interese aldoni, ke la urba



kongresa help-servo eĉ kelkfoje mem kontaktis Esperanto-Societon Kebekian kaj proponis helpon, se la societo iam volus organizi UK-on, kaj ĝi jam komencis helpi pri preparlaboroj !

Kulture kaj lingve diversa

Ekloĝinte en Montrealo antaŭ kelkaj jaroj, min tre impresis komence, ke en la vendejoj oni ofte

salutas vin per la kunmetaĵo de franca kaj angla « saluton » : « Bonjour-hi ». Se vi daŭrigas en la franca, oni daŭrigas en la franca, se en la angla — oni daŭrigas en la angla.

La oficiala lingvo de Kebekio estas la franca — fakte, Montrealo estas la plej granda franclingva urbo en la

mondo post Parizo — sed la urbo estas plurlingva : la franca estas la plej ofta lingvo, kaj la angla la dua plej ofta lingvo, sed vi ne povas iri tra la urbocentro sen aŭdi almenaŭ dekon da lingvoj

de novaj montrealanoj, ĉar ĉirkaŭ kvarono de la montrealanoj estas alilingvanoj. Ĝentila kaj bonveniga, Montrealo fieras pri sia multkultureco : por enmigrantoj el dekoj da landoj (kaj tio inkluzivas ankaŭ min) Montrealo fariĝis dua hejmo, kaj ili riĉigas Montrealon per diverseca kuirarto kaj pluraj etnaj festivaloj. Antaŭ kelkaj jaroj *Lonely Planet*, eldonisto de turistaj gvidlibroj, eĉ nomis Montrealon la dua plej feliĉa loko en la mondo (ĝi cedis la unuan lokon nur al la insulo Vanuatu) ĝuste dank' al ĝia refreŝiga multkultureco kaj bonegaj someraj festivaloj, inkluzive de grandega komedia festivalo — unu el la plej grandaj en la mondo. Progresema kaj liberala, ĝi ofte altiras ankaŭ similtipajn enmigrantojn kaj studentojn, kaj ĝi ankaŭ estas malfermita al ĉio « stranga »... kiel Esperanto !



Famaj montrealaj kurbaj ŝtuparoj

150 + 375

En 2017 kanadanoj festas du gravajn eventojn: 150-jariĝon de Kanado kaj 375-jariĝon de Montrealo. La urbo esperas allogi multajn organizojn kongresi en Montrealo ĝuste en tiu jaro, kaj en la retejo dediĉita al la evento (www.375mtl.com) oni listigas kongresojn okazontajn en la urbo en tiu jaro (la plejparto de kongresoj okazas tamen ne en somero). Se UK okazos en Montrealo en 2017, la jubilea retejo reklamos ankaŭ nian kongreson — kaj Esperanton! Por festi la datrevenon, la urbo planas multajn festivalojn kaj koncertojn, kio signifas, ke ni povus aranĝi interŝanĝojn de artistoj — kia bonega kaj unika okazo reklami Esperanton!

Ĵurnalistoj amas nin!

En 2012, kiam Esperanto festis sian 125-jariĝon kaj Esperanto-Societo Kebekia festis sian 30-jariĝon, la

Kanada Radio Internacia intervjuis esperantistojn en kvar lingvoj (vidu la bildon), kaj aperis ankaŭ kelkaj ĵurnal-artikoloj. La pasintaj E-eventoj en Montrealo (plej lastatempe, Tut-Amerika Kongreso en 2008) ĉiam estis bonega okazo reklami Esperanton en amas-komunikiloj, kaj la sinteno de ĵurnalistoj al Esperanto estis pozitiva. Imagu, kian belan okazon ĵurnalistoj havus paroli pri Esperanto dum la novaĵ-vakua tempo de la someraj parlamentaj ferioj, se ili povus montri, ke por festi la du jubileojn (kaj ankaŭ 35-jariĝon de ESK!) la urbo venigis Esperantajn gastojn el la tuta mondo !

Forta loka movado

Eble, ĉar Kebekio estas pli konscia pri lingvaj problemoj ol en aliaj partoj de Nord-Ameriko, la Esperanto-Movado en Kebekio ĝenerale, kaj en Montrealo aparte, estas tre forta (eble, temas pri la plej forta loka Esperanto-movado en la tuta Nord-Ameriko) : la Esperanto-Societo Kebekia — ESK — fondiĝis en 1982 kaj havas centon da membroj kaj ĉiujare organizas aŭtunan kaj printempan renkontiĝojn, eldonas altkvalitajn librojn kaj tiun ĉi bultenon, kaj



ĝi jam kelkfoje gastigis internaciajn eventojn : IJK-on en 1992, Nord-Amerikan Kongreson en 1998 kaj Tut-Amerikan Kongreson en 2008. Sed...

UK neniam okazis en Montrealo...

Bedaŭrinde, ĉu ne? La unua kaj la lasta UK en Kanado okazis en 1984 en Vakuvero (ĉe la okcidenta marbordo) — 3700 km for de Montrealo (tio estas pli malproksime ol de Berlino al Tehrano)... longe antaŭ la esperantistiĝo (aŭ eĉ naskiĝo) de multaj ESK-anoj. Por kompari, ekde la Vankuvera UK okazis jam 19 UK-oj en Eŭropo kaj kvin en Orienta Azio (1986 Pekino, 1994 Seulo, 2004 Pekino, 2007 Jokohamo, 2012 Hanojo). Fakte, la lasta fojo, kiam UK okazis ĉe la orienta flanko de la kontinenta Nord-Ameriko, estis en 1910 (Vaŝingtono) — Zamenhof mem partoprenis ĝin ! Eble, la tempo venis denove kongresi en la orienta Nord-Ameriko ?!

Sed kio do pri sciuroj ?..

En la reklambroŝureto pri Montrealo por la bonaera UK (vidu paĝon 5) ni menciis « la plej ĉarmajn sciurojn en la mondo ». Bone, mi eble

konfesu, ke mi iomete troigis pri tio (eble plej ĉarmaj en Nord-Ameriko, ne en la mondo ☺). Sed nun tute serioze : la montrealaj sciuroj ja estas ĉarmaj bestetoj, kiuj tute ne timas homojn kaj en multaj parkoj per ĉarma pozo kaj kompatindaj okuloj petas manĝaĵojn al la preterpasantoj (la novaj enmigrintoj kaj turistoj ĉiam fotas sciurojn — ankaŭ mi pasigis la unuajn kelkajn tagojn promenante kaj fotante la famajn montrealajn kurbajn ŝtuparojn kaj... sciurojn !). Blanka kaj nigra sciuroj kun amuza frapfrazo « mi sciuras en Esperanto » estis emblemo de la IJK en Montrealo. Nu, ĉar sciuroj tiom bone zorgis pri la sukceso de la IJK antaŭ 25 jaroj, eble ili same bone zorgos pri la sukceso de la UK en 2017. ☺



Fine de septembro 2014 lanĉiĝis la Facebook-paĝo Montrealo 2017— Kandidatiĝo por la 102a Universala Kongreso: facebook.com/Montrealo2017. En tiu paĝo aperos ne nur novaĵoj pri la preparo al la UK, sed ankaŭ diversaj interesaĵoj pri la urbo. Ni elkore invitas vin viziti kaj ŝati ĝin, kaj inviti viajn amikojn fari la samon !

Bv. noti ke ESK havas novan poŝtadreson !

**3-3791, av. Linton
Montréal QC H3S 1T3**



KER-ekzamenîgu !



Francisko Lorrain

De plus en plus d'espérantistes se prêtent à l'examen d'espéranto selon le « Cadre européen commun de référence pour les langues » ([CECRL](#)). Des sessions ont lieu chaque année dans le monde entier, depuis 2009. C'est là une façon convaincante de montrer que l'espéranto est une langue égale à toutes les autres.

La tagon post la ĉi-jara NASK (vidu la koncernan artikolon), la 8-an de julio, okazis en la Universitato de Viktorio sesio de Esperantaj KER-ekzamenoj por naŭ kandidatoj. Tiuj estas ekzamenoj laŭ la normoj de la « Komuna Eŭropa Referenckadro » ([KER](#) — france [CECRL](#), Cadre européen commun de référence pour les langues).

Kio estas tiu KER ? Ekzistas en Eŭropo KER-ekzamenoj por pluraj eŭropaj lingvoj. Kaj oni kreis samnormajn ekzamenojn ankaŭ por Esperanto ! Kaj eĉ por la ĉina. Ilia avantaĝo estas, ke la kompetentoj necesaj por atingi precizan nivelon (ekzemple la nivelon B2) estas la samaj por ĉiuj lingvoj. Sekve, se vi montros al funkciulo, dunganto aŭ lerneja direktoro vian KER-diplomon je nivelo B2 por ajna



lingvo, inkluzive Esperanton, li facile povos kontroli, kiujn kompetentojn vi akiris en tiu lingvo, eĉ se li tute ne scipovas ĝin.

La Esperantajn KER-ekzamenojn organizas UEA kaj la Budapeŝta « Centro por perfektigo pri fremdaj lingvoj » de la Universitato Eötvös Loránd.

Por ke vi havu pli konkretan ideon pri tiuj ekzamenoj, jen kelkaj bazaj informoj pri ili. Estas ses niveloj : A1, A2, B1, B2, C1, C2, ekde preskaŭ komencanto ĝis la plej altgrada reganto de la lingvo. En Esperanto, la niveloj A1 kaj A2 estas tre facile atingeblaj kaj oni decidis ne produkti ekzamenojn por ili. Krome, ĉar por C2 estus ne granda nombro da kandidatoj, oni ĝis nun ne faris ekzamenojn por tiu plej alta

nivelo. Do nun estas Esperantaj KER-ekzamenoj nur por la niveloj B1, B2 kaj C1. Ĉiujare okazas kelkaj sesioj, en diversaj mondopartoj, en kiuj, entute sukcesis pli ol mil ducent kandidatoj (de 2009 ĝis aprilo 2014).

El kio konsistas KER-ekzameno ? Ĉiu havas du partojn : parolan kaj skriban. La parola parto (ĉe B1 kaj B2) konsistas el

- libera interparolado kun ekzamenanto pri difinita temo,
- memstara prezento de temo (surbaze de bildo),
- situacia ludo kun la ekzamenanto,
- testo pri aŭda kompreno de sonregistraĵo,
- la skriba parto (B1, B2) el
- testo pri lega kompreno,
- lingvokonaj taskoj,
- skriba sinesprimo (letero pri unu el du eblaj temoj).

La C1-ekzameno enhavas krome parolan kaj skriban tekstokomentadojn.

La daŭroj de la parolaj partoj ĉe B1, B2, C1 estas respektive 40, 45 kaj 60 minutoj, tiuj de la skribaj partoj 2, 3 kaj 4 horoj. Laŭ nia sperto, tiuj tempodaŭroj sufiĉas. Eblas elekti nur la parolan aŭ skriban parton.

Por sukcesi en iu nivelo, oni devas ricevi almenaŭ 60-elcentan noton kaj en la parola kaj en la skriba partoj. Tio ne estas malfacile atingebla... se oni elektis la ĝustanivelan ekzamenon !

Gravas scii ankaŭ, ke, male al la ILEI-ekzamenoj (Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj) kaj aliaj, la KER-ekzamenoj ne enhavas parton pri kulturo aŭ historio, sed rilatas nur al la lingvo mem.

Oni trovos [specimenojn](#) de ĉiuj ekzamenpartoj kaj niveloj en la KER-ekzamena paĝaro. Ekzistas ankaŭ bona libro kun tiaj specimenoj, mendebla ĉe diversaj Esperantaj libroservoj : *Esperanto de nivelo al nivelo*, 136-paĝa. Ni alte rekomendas al interesatoj unue prov-ekzameniĝi hejme per tiuj specimenoj ; vi estos tiam multe pli trankvila kaj memfida, kiam vi trapasos la veran ekzamenon.

Mia edzino Minjo Renaud kaj mi respektive elektis la nivelojn B1 kaj C1. Ni ĝis nun ricevis niajn notojn — kuraĝigajn — nur por la parola parto. La skriba parto estas nun korektata en Hungarujo kaj niaj notoj alvenos poste.

Kuraĝu — kiel faris jam multaj Esperantistoj, eĉ inter la plej famaj ! Samtempe, informoj pri la nombroj de sukcesintoj de la KER-ekzamenoj helpas reklami Esperanton kiel lingvon saman kiel aliaj.

Esti aŭ... *UĜ G2FI I*

Francisko Lorrain

L'espéranto a-t-il besoin d'être pour être, se demande l'auteur.

Tion diris al si, demande, Hamleto ĉe Ŝekspiro. Ĉu valoras ekzistado ? Ĉu ĝi indas ? Pri tio ĉiutage demandas sin multaj suferantoj. Sed nek gurdan, nek malgurdan respondon atendu de mi. Min mem sufiĉe incitas tiu demando, en malĝojaj momentoj. Kaj foje eĉ en ĝojaj, sed, ial, malpli akre...

Nu, Esperanto grave helpas pri ĉio tio, ĉar ĝi anas inter tiuj malmultaj lingvoj, en kiuj la diskutata trilitera radiko verdire nur balastas, kaj do forĵetebblas. Se mankos la verbo, malaperos la problemo — espereble.

Sed ĉu tion dirante mi ne senpardoneble atencas kontraŭ la Fundamento ? Fi ! Ekzistado pli gravas ol ajna Fundamento. Kaj fakte ĉu la zamenhofaj dek ses reguloj ne subkomprenas eĉ pli fundamentan regulon :

(0) *Neceso kaj sufiĉo* konsistigas la bazajn gvidajn principojn de Esperanto.

Jen la fundamento de fundamentoj ! Gravegas, laŭ mi, multe pli strikte apliki ĝin, ol ni faris ĝis nun. Kiel unuan paŝon en tiu direkto, mi proponas la forigon de tiu terura, katastrofa, malinda, aĉega radiko, kiun ni nepre ne nomu. Kaj por pruvo de la praveco de tiu ideo, kontrolu, ke mi de post la supra, hontinda kvankam necesa, titolo ne plu uzis ĝin. Kaj mi promesas *neniam* plu uzi ĝin. Ĉiujn, kiuj daŭre uzos ĝin, mi taksos malseriozaj Esperantistoj, malhelpantoj de la homaro kaj obstakloj kontraŭ la homa feliĉo.

Ĉu, kun tia radiko, nia lingvo povos iam ajn konkeri la mondon ? Ne, milfoje ne. Sed forpelu ĝin el Esperanto, kaj ĉi-lastaj fariĝos plej potenca feliĉigilo — kaj jam sufiĉe klare konturiĝos la fina venko !

En 1969, la franca verkisto Georges Perec [ĵorĉ] perek] verkis romanon titolitan *La disparition* [La malapero], en kiu nenie aperas la litero e. Sen e,

en la franca, multaj uzoj de la priparolata verbaĉo ne eblas. Perek iasence avanis en la nova direkto, kiun mi proponas por la Esperanto-movado. La forigo de e el Esperanto havus la saman efikon, eĉ pli radikalan, sed mi malrekomendas tion. Neceso kaj sufiĉo : la sen-e-igo de nia lingvo nur kripligus ĝin, dum sufiĉas forpreni tiun ununuran radikon por ricevi radie kontentigan rezulton ! Ni evitu tro radikalajn proponojn, kiuj, eĉ se ili tute pravus,

nur ridindigus nin antaŭ la mondo. Sed senhezite ni aprobu tiujn modestajn iniciatojn, kiel la supre priskribita, bazitajn sur la plej sanktaj principoj de nia lingvo.

Noto de la redakcio : Karaj legantoj, ni invitas vin pripensi verkaĵon pri propono malaperigi same terurajn, katastrofajn, malindajn kaj aĉegajn... artikolojn! ☺

Malpli oftaj fundamentaj vortoj

Francisko Lorrain

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Mi do decidis komenci mallongan kronikon prezentantan ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj []. Alta ^Z indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta ^G grabowski-an.

★ **admon/i** (tr) 1 Instigi per parolo al la plenumo de ago aŭ devo : *oni ~as min, ke mi ne miksu min en la aferojn*^Z. ☞ *instigi* [★]. 2 Severe riproĉi, mallaŭdi pro malbona konduto : *la instruisto ~as la lernantojn pro ilia maldiligenteco*. ☞ *skoldi* [ne fundamenta].


★ **afekt/i** (tr) 1 Ŝajnigi ion per nenaturaj, nesimplaj manieroj : *~i solenan sintenadon*. ☞ *hipokriti* [★]. 2

Fari mienojn, kvazaŭ oni ne volus, dum oni ja volas ; montradi nesimplan, pretendeman, atentovekan sintenadon : *ne ~u, infano, kaj ne enmetu al vi frenezajojn en la kapon !*^Z.

★ **agac/o**. Malagrabra nervincita sento, kaŭzata ekzemple de acida frukto, de akuta bruoj kaj simile. ~i (tr) Kaŭzi tian senton : *Dio manĝon donacis, sed la dentoj ~as*^Z. ☞ *iriti* [^G].

Turismi kaj esperantumi

Minjo Renaud



Cette année le cours d'espéranto offert par NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) avait lieu à Victoria, en Colombie-Britannique. Ce fut l'occasion de découvrir l'Ouest canadien et de participer au cours intermédiaire dirigé par Hiroyuki USUI. Il nous a transmis une part de la culture espérantiste orientale à travers des chants, et, à partir de textes critiques de Baldur Ragnarsson, nous avons analysé les œuvres d'auteurs très importants, de Zamenhof à Auld. Ce séjour fut très enrichissant, autant sur le plan du milieu que des apprentissages.

Viktorio ricevas oceanan aeron kaj tie malfermiĝas la horizonto al la neĝaj pintoj de la Olimpa montaro. Malgranda urbo kun reĝa nomo, kiu konservas la estintan ĉarmon, kiun la civitanoj flegas ĝis en siaj ĝardenoj. Plantoj, kiujn mi vidis nur dum mia infaneco, reaperas tie magie. Naturo estas prizorgata ; nur eta vojeto por paŝi tra altaj herboj sovaĝaj. Parkoj kaj ĝardenoj feliĉigas ardeojn, pavojn, kapreolojn ; la vivo apartenas al ĉiuj.

Irante pli norden, tridek minutojn per buso, ni alvenas al Butchart Gardens, impona bieno kun diversaj plantspecioj, ekzemplo de tio, kio rezultas, kiam ideoj konverĝas kaj harmonio estas celata. Jen mallonga historio de tiu ĝardeno.

Komence de la jaro 1900, sinjoro Butchart riĉiĝas ekspluatante ŝtonminejon por provizi sian cementan fabrikon. Iom post iom, la ŝtonminejo elĉerpiĝas kaj fariĝas dezerteca loko. En tiu momento, sinjorino Butchart decidas kun sia

kreivo redoni vivon al tiu loko. Ŝi plantas, semas, kultivas, inventas ĝardenon. Necesis certe multa amo por realigi tiun projekton, kiu tiom ravas hodiaŭ.

Revenante al la Universitato de Viktorio, kie NASK komenciĝos la 28-an de junio, mi demandas min : kiu mi estas en mia lando tiel nekonata, kun miaj antaŭjuĝoj ?

En NASK, la meznivela kurso estos pliprofundiga stadio, kiu taŭgos por miaj lingvaj kapabloj.

La instruisto Hiroyuki Usui ritmas la tri horojn kaj duonon inter legado laŭtvoĉa, poemoj, kantoj majstre akompanataj de du « famaj » muzikistoj, Alex kaj Andrew, kaj analizoj de tekstoj de Baldur Ragnarsson pri gravaj aŭtoroj — de



Dum la diplomiĝa ceremonio de NASK : Minjo brakumas la instruistinon



Hiroyuki Usui regalis la publikon per elstara aktorado de la poemo *Ebrio*

Zamenhof (« en tiu korpo malforta de malalta viro, ŝvelis koro sentima kaj volo potenca », Edmond Privat) ĝis William Auld. Nia instruisto parolas ankaŭ pri du planlingvoj :

- volapük (volapuko) de J. M. Schleyer, publikigita en 1879,
- solresol de J. F. Sudre, publikigita en 1827.

Ni komparas la malfacilaĵojn kaj avantaĝojn de ambaŭ.

Gvidate de USUI, ni malkovras la poezion de Antoni Grabowski (*La tagiĝo*), la prozon de Kazimierz Bein (la fama Kabe), kiu « elegantigis la Esperantan prozan stilon sub la signo de klareco kaj ekvilibro ». Ankaŭ, sub la plumo de B. Ragnarsson, ni malkovras Kálmán-on Kalocsay, kiu kreis fidon pri la kapabloj de Esperanto : « sen

la unika laborado de Kálmán Kalocsay nia literaturo supozeble ne havus tian kulturan statuson, kian ĝi havas nun. » Kion diri pri Julio Baghy, majstro de la dialogo, kiu parolas pri vivrealaj temoj, ofte intime ligitaj al liaj rememoroj ? Sen forgesi la poetinon Marjorie Boulton, kiu analizis la poemon *Ho, mia kor'* de Zamenhof. Kaj fine W. Auld kun sia poemo *Ebrio* : Usui fermis la kurson per memorinda aktorado de tiu poemo.

Inter kursoj, prelegoj, ni trovas kelkajn momentojn por ekzerciĝi laŭ la Margaret-Morris-metodo sub la arboj en la interna korto de nia konstruaĵo. Ni dividas bongustan manĝon ekstere dank' al Steĉjo pro lia aventurema stilo kaj liaj meditaj sesioj. La okazaj konversacioj estas multaj, la temoj diversaj. La tempo estas kalkulita, sed la



etoso agrabla. Mia kompreno de la Esperanta movado plialtiĝas. Mi povas elekti aŭtorojn laŭ mia sento. Ankaŭ, la KER-ekzameno permesas difini ŝtupon en mia lernado. Sen streĉo mi renkontas novajn homojn, babilas pli libere, fortigas la rilatojn ; nun mi sentas min en la movado.

Tiu dua NASK-sesio bazita sur Esperanta literaturo permesas al ni disvolvi kritikan pensadon, kompreni la kuntekston de epoko, travivi sperton bazitan ne sur lingvolernado sed sur komunikado, serĉi

informojn, kompari ideojn, finfine esprimi nian koran kaj spiritan junecon.

Turismi kaj esperantumi entute pliriĉigas la vivon.

Fotoj : la aŭtoro kaj Ĵenja Amis

Viktorio vizitinda ! Kaj krome kun NASK...

Francisko Lorrain



*Les quartiers de la ville de Victoria (Colombie-Britannique) situés près du bord de la mer sont vraiment charmants. Après avoir visité la ville pendant quelques jours, nous avons participé à un cours d'espéranto appelé **NASK**, donné chaque été depuis de nombreuses années, jusqu'à maintenant toujours aux États-Unis, mais cette année à Victoria. Ce cours intensif dure huit jours et offre trois niveaux d'apprentissage, auprès de professeurs remarquables.*

Mia edzino Minjo Renaud kaj mi pasigis ĉi-somere du semajnojn en Viktorio, en Brita Kolumbio. La urbo situas ĉe la sud-orienta angulo de la insulo Vankuvero kaj bordas la markolon Juan de Fuca [ĥuan de fuka] (16a-jarcenta esploristo de greka deveno, kiu servis la reĝon de Hispanujo).

Tri tagojn ni promenadis en la urbo, vizitante ie kaj

tie. Oni rekomendis al ni kelkajn restoraciojn, verdire elstarajn. La urbocentro, krom la parlamentejo kaj hotelo *Empress*, ne aparte allogas, sed la apudmaraj loĝkvartaloj tre agrablas. Ĝuste en tia loko ni loĝis unue, dum tiuj tri tagoj. Altiras la okulon granda diverseco de birdoj, floroj kaj aliaj plantoj — kiel ilekso (france « houx », angle « holly »), Menzies-arbuta (france

« arbousier d'Amérique », angle « arbutus » aŭ « madrona ») kaj multaj aliaj, kiuj tute mankas en Kebekio. Ĉio tio observeblas tiel ĉe privataj domoj, kiel en publikaj parkoj kaj ĝardenoj.

La arkitekturo de la domoj same diversas, multe pli ol ĉi tie. Ĉu ĉar la tiea klimato permesas pli da fantazio, aŭ ĉar la tieaj leĝoj lasus pli da libero al la arkitektoj, ol ĉi tie ? Mi ne scias.

Marborde, ravas la panoramo de la Olimpa montaro, aliflanke de la markolo, en Vaŝingtonio, Usono.



Poste ni transloĝiĝis al la Universitato de Viktorio, kie komenciĝis [NASK](#) (la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto), daŭranta entute ok tagojn, kun pli ol sesdek studentoj, ĉefe el Usono kaj Kanado, sed ankaŭ el Ĉinujo, Japanujo, Eŭropo, Meksiko kaj eĉ Aŭstralio.

Instrua sperto estis tio. Mi partoprenis en la kurso de la supera nivelo (el tri), kiun ĉeestis homoj sufiĉe malsamnivelaj, de progresantoj ĝis plej spertaj. Nia instruisto estis [István Ertl](#), sufiĉe fama

esperantisto, aktivanta en Esperantujo kiel verkisto, tradukisto, interpretisto, redakciano ĉe diversaj revuoj, kaj instruisto ; li siatempe kunfondis la sendependan retan bultenon [Libera Folio](#). Tre kapabla kaj kompetenta homo, kun

profunda kono de la lingvo. Li sufiĉe multe laborigis nin, taskante nin ĉiutage verki ion pri difinita temo, legi tekston aŭ cerbumi pri io. Liaj kursoj emfazis gramatikon kaj vortelekon (rilate iun aŭ alian literaturaĵon), spronante multajn diskutojn en la klaso, sed li instruis ankaŭ pri tradukado kaj literaturo.

Unu el niaj taskoj estis :

skribu kiom eble plej da senchavaj kunmetaĵoj entenantaj la radikon *kuk*. Tiu, kiu plej multe kreis, estis komputilisto, kiu imagis skemon similan al ĉi tiu : prenu dudekon da taŭgaj eblaj prefiksoj, aldonu la radikon *kuk*, poste unu el kelkaj taŭgaj sufiksoj, poste unu el alia taŭga sufiksaro, ktp, tiel, ke la rezulto havu iel kompreneblan sencon. Entute li povis tiel krei ĉirkaŭ ducent mil kunmetaĵojn !

Ertl rimarkis interalie, ke, malgraŭ la relativa

logikeco de Esperanto, en ĝi foje regas kutimo pli ol logiko. Jen ekzemplo. La radikoj *uz* kaj *instru* estas ambaŭ verbaj radikoj, kaj la respondaj verboj, *uzi* kaj *instrui*, estas ambaŭ transiraj. La substantivo *uzo* havas, antaŭvideble, la signifon « ago de iu, kiu uzas » — ekzemple « la uzo de la aparato estas tre simpla ». La baza signifo de la substantivo *instruo* devus esti, same, « ago de iu, kiu instruas », sed fakte la signifo de *instruo* registrita en NPIV estas alia : « tio, kion oni instruas » — ekzemple « ricevi instruon pri io » aŭ « la instruoj de budhismo ». Nu, oni povus argumenti, ke en la unua ekzemplo la vorto povus havi ankaŭ la sencon « ago de iu, kiu instruas ». Tamen, dum la frazo « la uzo de tiu broso ĉiutagas ĉe ni »



Ĉarmaj cervoj en la insulo Vankuvero
tute ne timis homojn



Totemoj estas grava parto de parkoj kaj
diversaj publikaj lokoj en Brita Kolumbio

tute normalas, ne tute normalas « la instruo pri Esperanto ĉiutagas ĉe ni », se la senco estas « la instruado pri Esperanto ĉiutagas ĉe ni ». Sekve la esprimo « la uzo de prepozicioj » kutime sufiĉas (anstataŭ « la uzado de prepozicioj »), dum en « la instruado pri prepozicioj » la ad-sufikso, normale almenaŭ, ne malhaveblas.

Ekster la kursoj, ĉiuposttagmeze kaj ĉiuvespere, iu instruisto aŭ studanto gvidis « atelieron » aŭ prezentis ion pri iu temo aŭ alia : la arto traduki, la japana teceremonio, ktp.

Ĉi-jare, krome, post NASK okazis sesio de la famaj KER-ekzamenoj, pri kiuj vi povos lerni en alia samnumera artikolo.

Fotoj : la aŭtoro kaj Ĵenja Amis

Paco komenciĝas en Nagasako !

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

Après sa visite à Hiroshima, notre rédactrice nous emmène cette fois-ci à Nagasaki, ville bien connue à cause de sa triste histoire et pourtant peu connue des touristes.

Vizitinte Hiroŝimon pasintjare, ni volis dum la sekva vojaĝo al Japanio viziti la duan atombombitan urbon, Nagasakon, kiu situas sur la trie plej granda japana insulo, Kjuŝu, do, iom malproksime de la kutimaj turismaj vojoj. Mi konfesu, ke antaŭ nia vizito al Nagasako mi sciis nur pri la sombra parto de ĝia historio kiel la dua atombombita urbo, kaj tute ne konis la aliajn flankojn. Ekzemple, ke la nokta vido de Nagasako estas inter la plej belaj en la mondo : la multaj lumoj sur la deklivoj de la urbo respeguliĝas en la trankvila akvo de la golfo kaj similas al perlaj fadenoj ĵetitaj sur brilan nigran silkon... Oni nomas tiun vidon « Dekmilion-dolara vido » aŭ, por ni esperantistoj, ĝi estus « Dekmilion-stela

vido » ☺. Mi ankaŭ ne imagis, ke en Nagasako eĉ post la atombombado konserviĝis multaj antikvaj vidindaĵoj, kiel la plej malnova ŝtona ponto en Japanio ; aŭ ke oni ĝis nun povas viziti la lokon, kiu dum du jarcentoj de izoligo estis la sola fenestreto de Japanio al la mondo ; aŭ ke Nagasako aparte famas pro sia kuirarto : jen bona ekzemplo de kultura kunfandiĝo kaj tipe japana trajto absorbi kaj plibonigi. Mi ankaŭ ne sciis, ke la historio de kristanismo en Japanio estas tiom ligita ĝuste al tiu urbo. Ni komence planis veni al Nagasako por nur unu tago, sed la esperantistoj el la urbo avertis, ke tri tagoj estos apenaŭ sufiĉaj por eĉ supraĵe vidi ĉiujn trezorojn, kiujn kaŝas la urbo — kaj ili pravis !

Ekde la unua rigardo ni komprenis, kiom malsamaj estas la urboj Hiroŝimo kaj Nagasako laŭ sia etoso : la larĝaj rektaj stratoj de Hiroŝimo kontrastas kun la mallarĝaj kaj krutaj stratetoj de Nagasako, kaj nia gvidanto, s-ro Moriŭaki, montris sin ne nur bonega ĉiĉerono, sed ankaŭ elstara ŝoforo, sukcesante senpene manovri preter aliaj aŭtoj, biciklistoj, aŭtobusoj kaj piedirantoj sur la stratoj, kiuj estas apenaŭ larĝaj eĉ por unu aŭto. S-ro Moriŭaki naskiĝis kaj studis en Hiroŝimo, sed junaĝe li translokiĝis en Nagasakon por labori por la plej granda dunganto de la urbo, Micubiŝi. Tiu kompanio estiĝis en Nagasako kaj eĉ havas sian propran straton — la straton Micubiŝi, tuj apud la haveno, kie troviĝas enorma ŝipfarejo de tiu mondfama giganto.

La sanktulo de Urakami

Dum nia tritaga restado en Nagasako ni tranoktis en katolika gastejo, kie afable loĝigis nin la esperantistoj el Nagasako. (Mi surpriziĝis ekscii, ke la gastejo eĉ donas rabaton por kristanoj ! Por pruvi, ke oni estas kristano, oni simple devas diri

tion al la akceptistino : neniuj aliaj pruvoj necesas !) Tiu gastejo troviĝas en la kvartalo Urakami, apud la katedralo kun la sama nomo — siatempe la plej granda kristana preĝejo en Orienta Azio, ĝi estis plene detruita de la atombombo, kiu eksplodis ĉirkaŭ 500 metrojn de la preĝejo... La katedralo estis rekonstruita, sed



Damaĝitaj statuoj apud la katedralo Urakami: silentaj atestantoj de la detrua forto de la atombombo...

apud ĝi oni daŭre povas vidi la restaĵojn de la originalaj muroj kaj kelkajn statuojn : bruniĝintaj kaj makulitaj pro la eksplodo, severe damaĝitaj, ili estas atestantoj de la detrua forto de la atombombo... « Neniu povas gajni aŭ perdi la militon. Ekzistas nur la detruo. La homoj ne naskiĝis por batali... » Tion skribis verkisto kaj

kuracisto, d-ro Takaŝi NAGAI. Lia muzeo situas en la kvartalo Urakami, kie troviĝis la epicentro de la eksplodo, kaj tiu malgranda muzeo kaj la kortuŝa rakonto de amo, kuraĝo kaj espero de tiu mirinda persono lasis sur min plej profundan impreson...

Radiologo laŭprofesie, kelkajn monatojn antaŭ la atombombado li estis diagnozita je leŭkemio, sed, eĉ post la atombombado, mem malsana kaj

severe vundita, li tamen dum kelkaj tagoj kuracis sennombrajn viktimojn, kiuj inundis lian hospitalon. Finfine li foriris el la hospitalo por iom ripozi kaj esperis revidi sian edzinon, Midori, sed la domo estis tute detruita... En la loko, kiu antaŭe estis la kuirejo, li trovis nur cindrojn, ankoraŭ varmajn, apud kiu kuŝis kruco kaj rozario — jen ĉio, kio restis de lia amata edzino... Malsana je leŭkemio, li certis, ke lia edzino supervivos lin, sed la sorto decidis alimaniere... S-ro Nagai vivis ses pliajn jarojn, kaj dum tiu tempo li laboregis instruante, prizorgante vunditojn kaj verkante, ĝis la fino. Unu el liaj verkoj, « La sonoriloj de Nagasako », vive rakontas liajn spertojn pri la atombombado, kaj ĝi fariĝis bazo por filmo kaj inspiris kanton kun la sama nomo, kiu mallaŭte ludas en la muzeo.

Apud la muzeo staras eta dometo, apenaŭ tri kvadratmetrojn granda kaj sufiĉa por kuŝigi nur unu personon. Ĝin konstruis por d-ro Nagai liaj



La ermitejo de d-ro Nagai, kiun konstruis liaj amikoj el la restaĵoj de lia domo



amikoj el la restaĵoj de lia detruita domo, kiam li mem estis tro malforta por piediri. Tiu modesta dometo fariĝis la ermitejo, kie d-ro Nagai verkis kaj pasigis tempon kun siaj du infanoj, kaj de kie li povis vidi la ruinojn de la katedralo Urakami, trans la dezerto lasita de la atombombo.

Pensulo kaj humanisto, li antaŭsentis, ke Nagasako estos detruita kaj avertis pri tio, kiam Japanio eniris la militon. Sed li ankaŭ esperis, ke ĝi estos la lasta urbo detruita de la atombombo : « Paco komenciĝu de Nagasako », li skribis. Pro liaj verkoj, kuraĝo, senlaca laboro por aliaj kaj lia trista sorto oni nomas lin sanktulo de Urakami. En sia modesta ermitejo li ricevis plurajn gravulojn — ekde Hellen Keller (la blind-surda usona verkistino) ĝis la imperiestro de Japanio. La honorariojn de siaj verkoj li malavare uzis por la bono de sia urbo : jen por planti mil ĉerizarbojn en Urakami, jen por konstrui monumenton por infanoj, mortigitaj de la atombombo, jen por biblioteko.

La vetero, kiu ŝanĝis la historion...

La Urakami-katedralo, kies ruinojn vidis el sia modesta dometo s-ro Nagai, estis konstruata dum longaj 30 jaroj : ekde 1895 ĝis 1925... sed en unu momento ĝi estis detruita per la atombombo, kiu mortigis la plejparton el la paroĥanoj. Ili pereis kune kun 80 mil viktimoj, el kiuj nur ducent estis soldatoj (oni bombis Nagasakon ne por mortigi militistojn, sed por detruigi la uzinojn de Micubiŝi, kiu en sia tempo faris la armilojn uzitajn dum la atako al Pearl Harbor...). Multaj homoj estis perforte devigitaj labori en armilaj uzinoj, inkluzive de esperantisto, kun kiu ni konatiĝis en Nagasako kaj kiu estas jam pli ol 90-jaraĝa : bonŝance, li estis sendita al aliloka uzino, kaj dank' al tio li supervivis.

En la pac-muzeo de Nagasako ni lernis, ke tiu urbo estis nur la dua celo de la atomboma atako : la unua celo estis la urbo Kokura, en la norda parto de Kjuŝu, kie



10-metra Pac-Statuo



La unupieda torio : la alia piedo estis faligita pro la eksplodo de la atombombo

troviĝis granda milituzino, sed oni ŝanĝis la planon pro la nuboj super la urbo. Jen kiel tia hazardo, kiel vetero, povas ŝanĝi la historion... Kaj estis la destino de Kokura esti la unua urbo ekster Nagasako, kiu ricevis la atombombajn viktimojn, diris al ni la avino de nia amiko Takamiĉi NITTA. Dekok-jara, ŝi volontulis por fariĝi flegistino en la hospitalo de Kokura. La hospitalo estis plenplena, ŝi rakontas, kaj unu el la taskoj de flegistinoj estis forigi la insektojn el la oreloj de la vunditoj. « Vi estas kuraĝa », ni diras al ŝi kun admiro, eĉ se ŝi neas tion ridetante. Ekde la komenco de la okupacio, ŝi estis la sola flegistino, kiu restis labori en la hospitalo : la aliaj foriris, ĉar ili timis eventualan perforton de soldatoj. « Mi nenion timis », ŝi diras al ni, kaj ni silentas iom da tempo... Mi provas imagi, kiel tio sentiĝis, esti la sola flegistino en

hospitalo inundita per atomombaj vunditoj, en la varmaga aŭgusto de 1945...

Kristanoj el Nagasako

Midori — la edzino de d-ro Nagai — estis unu el miloj da aliaj kristanoj, kiuj pereis pro la atombombo, benita de kristanaj pastroj aliflanke de la mondo... Estante kristano, ŝi daŭrigis la longan tradicion de sia familio, kiu gvidis la movadon de la japanaj « kaŝitaj kristanoj » (*Kakure Kiriŝitan*) dum sep generacioj, kaj estas ankaŭ pro ŝi, ke ankaŭ ŝia edzo konvertiĝis al kristanismo.

La historio de tiu ĉi urbo kaj tiu de kristanismo en Japanio estas neapartigeblaj : ja ĝuste dank' al kontakto kun portugalaj esploristoj kaj misiistoj en la 16-a jarcento malgranda fiŝkaptista vilaĝo transformiĝis en unu el la plej gravaj komercaj havenoj de Japanio : la urbon Nagasako. La eŭropaj komercistoj alportis al Japanio tiajn « ekzotikaĵojn », kiel pano,

eŭropaj ŝtofoj, tabako kaj « tempura » (fritaĵoj, kiujn oni nun konsideras kiel tipan japanan manĝaĵon). Kun la portugalaj ŝipoj alvenis ankaŭ la religio de la Okcidento : kristanismo. Dum kelkaj

jardekoj Nagasako estis la urbo kun la plej granda nombro da kristanoj en Japanio, sed je la fino de la 16-a jarcento la sinteno de la registaro ŝanĝiĝis : pro la timo al la eksterlanda influo, la misiistoj estis forpelitaj, komerco kun eksterlando fariĝis severe limigita kaj komenciĝis kruelaj persekutoj kontraŭ kristanoj. Kelkaj miloj da kristanoj estis mortigitaj, aliaj devis rezigni sian religion, kaj aliaj praktikis kristanismon kaŝite... dum pli ol 200 jaroj !

La japanaj kristanoj devis esti aparte zorgaj kaj elpensemaj por ne esti kaptitaj kaj tamen povi daŭrigi sian religion. En muzeo dediĉita al la historio de kristanismo en Nagasako ni vidis diversajn objektojn : jen



La tabuloj por trovi kaŝitajn kristanojn : ili ofte ne povis surtreti la bildojn de Jesuo aŭ Maria



Juĝ-proceso de suspektata kristano

statuo de la budhisma bodisatvo de kompato, Kannon, kiu ofte aperas kun infano kaj kiu por kaŝkristanoj simbolis Maria-n kun la infano Jesuo ; jen statuetoj de Budho, surdorse de kiuj estas kaŝita kruco, kiun oni povas vidi nur metinte spegulon al la dorso de la statueto. Por eltrovi la kaŝkristanojn, oni testis ilin per la bildoj de Maria aŭ Jesuo sur lignaj tabuloj — la aŭtoritatuloj postulis, ke la persono tretu sur la bildon... Multaj kristanoj ne povis fari tion, kaj devis pagi por sia kredo per sia propra vivo...

La persekutoj kontraŭ kristanismo oficiale finiĝis en 1873, kaj la tiama papo, Pio la Naŭa, eĉ diris, ke estas miraklo, ke la japanaj kristanoj dum ĉ. 250 jaroj daŭrigis la diservojn, baptojn kaj liturgion en la latina lingvo (kiu kun la tempo fariĝis tute nereconebla). En pluraj lokoj en Nagasako ni vidis statuojn de la papo Johano Paŭlo la Dua, kiu vizitis la urbon en 1981 kaj baptis la infanojn de kaŝkristanoj. Kompreneble, ne ĉiuj kaŝitaj kristanoj transdonis sian religion de unu generacio al la alia : multaj aliĝis al japanaj

religioj kaj, post la fino de la persekutoj, multaj kaŝitaj kristanoj (re)fariĝis romkatolikoj.

« Oranda-san »

Travivis la atombombadon ankaŭ la artefarita insuleto Deĵima, nur 120 metrojn longa kaj 75 metrojn larĝa, konstruita je la kosto de kelkaj japanaj komercistoj, kiuj deziris komerci kun eksterlando dum la periodo de japana izoligo (1633-1853). La urbo kreskis kaj prenis parton de

la maro ; nun Deĵima estas parto de la urbo, kaj nur eta strio de akvo je ĝia rando estas rememorigo, ke iam antaŭe ĝi estis vera insulo. Malfacilas kredi, ke tiu ĉi peceto da tero dum longaj 218 jaroj estis la sola japana fenestreto al Eŭropo kaj la mondo.

Originale konstruita por internigi la portugalajn komercistojn, el la timo, ke ili disvastigos la malpermesatan kristanisman, ĝi fariĝis portempa hejmo por pluraj generacioj de komercistoj de alia lando : Nederlando. Kial oni malpermesis la portugalajn, sed enlasis nederlandanojn ? Simple !



**Majesta Oura-katedralo,
konstruita fine de la 19a j.c.**

Ĉar la nederlandanoj volis nur komerci kaj neniel intencis konverti la lokanojn al sia religio, kiel faris portugaloj. Malgraŭ tio, ke la nederlandanoj loĝis sur tia eta spaco, ilia influo al la japana kulturo estis enorma : ili importis varojn kaj enkondukis vortojn, kiel « ĉokolado » aŭ « biero », kaj la japanoj eĉ dum longa tempo nomis ĉiujn eksterlandanojn (ĉu nederlandanoj, italoj, francoj, rusoj, usonanoj) « oranda-san » — nederlandano (de la vorto « Holando » prononcata laŭ la japana sistemo). Sur la insulo troviĝis nur unu strato kaj kelkaj vicoj da domoj, kaj tie loĝis ĉirkaŭ 15-20 « oranda-san », sen edzinoj (la solaj virinoj, kiuj estis permesataj sur la insulo estis lokaj prostituitinoj). Pri la fremduloj zorgis ĉ. 25 japanaj familioj : gardistoj, interpretistoj kaj servistoj.

La insulo Deĵima estas tre malkutima insulo — ĝi ne estas ronda aŭ ovala, kaj havas strangan duonrondan formon, similan al tiu de ventumilo.

Kial tiu formo ? Estas kelkaj teorioj. Laŭ unu, ĝi estas pura hazardo : kiam oni demandis la

ŝogunon, kiu estu la formo de la insulo, li montris sian ventumilon kaj diris : « Faru ĝin tia ! » La pli kredebla teorio estas, ke tiuforman insulon, kiu iom respegulas la formon de la « ĉefa tero », estis pli facile konstrui en mallonga tempo. Alia teorio estas, ke ĝuste tia formo plifaciligas la observadon de la insulo el la apuda kastelo.



Deĵima antaŭe (supre) kaj nun

Post la malfermiĝo de Japanio al la mondo la insulo Deĵima perdis sian signifon, sed la urbo Nagasako restis loko de kontaktoj kun Eŭropo kaj la cetera mondo. Tio okazis grandparte dank' al unu individuo : la skoto Thomas Glover, bone konata en Japanio sed ne tiom konata en sia propra lando. Dudekunu-jara, li alvenis al Japanio preskaŭ tuj

post ĝia malfermiĝo al eksterlando : en 1859. Komence loĝinte sur Deĵima, li poste konstruigis luksegan domon, Glover Garden, kiu fariĝis la

scenejo de la opero « Madame Butterfly » de Puccini kaj kiu ĉiujare ricevas du milionojn da vizitantoj. La granda parto de lia frua komerco estis vendado de armiloj, multaj el kiuj uziĝis kontraŭ la ŝoguno kaj por apogi la subtenantojn de la imperiestro (estante mem brita lojalisto, li ankaŭ kontribuis al la restaŭro de la japana imperiestro).

Krome, Glover enkondukis al Japanio fervojon, komencis karbominadon, helpis fondi ŝipfaran kompanion, poste konatan kiel Micubiŝi, kaj helpis fondi komercan bierfaradon. (Iuj sugestas, ke la longaj lipharoj sur la fabela besto, kiu troviĝas sur la simbolo de la biero Kirin, estis inspiritaj de la longaj lipharoj de Glover.) Bedaŭrinda kromefiko de la modernigo de Japanio kaj restaŭro de la imperiestro, al kiu tiom pasie kontribuis Glover, estis kresko de militarismo kaj imperiismo, kiu kulminis en la Dua Mondmilito. Do, oni povas debati, ĉu la kontribuo de Glover al la eŭropigo, industriigo kaj liberigo de la japana merkato estis



La okulvitra ponto, konstruita en 1634

bona aŭ malbona por la lando. Sed, ĉiel ajn, Thomas Glover ŝanĝis la vizaĝon de Japanio kaj, certe, influis la mondan historion. Kaj jen ironio de la destino : la filo de Glover, kies patro estis tiom respektata en Japanio, estis suspektita esti spiono de la Okcidento kaj sinmortigis en la atombombita

Nagasako kelkajn semajnojn antaŭ la alveno de la usonaj soldatoj...

Forirante de la bela, amikema kaj tiom multe suferinta Nagasako, mi pensis pri la rolo, kiun ĝi ludis en la historio de Japanio kaj de la mondo en la lastaj 500 jaroj, kaj ankaŭ rememoris la vortojn de s-ro Nagai : « Paco komenciĝu de Nagasako. » Paco kaj espero... Se malgraŭ la prognozoj, ke en la urbo dum 75 jaroj ne kreskos iuj ajn plantoj, la sakuro-arboj de d-ro Nagai floris jam mallongan tempon post la atombombado, tio ja donas esperon al la tuta mondo !



Pri la financoj



Silvano la kasisto Auclair

Bien que les finances de la SQE soient fondamentalement saines, nous avons dû inscrire cette année une perte de plus de 1000 \$. La raison en est l'édition, à perte, du livre Kristnaskaj Rakontoj el franca Kanado, et ce, malgré un don important ayant permis cette édition.

Agado egalas elspezojn. Nenio pli bone ilustras tiun kvazaŭan proverbon ol la pasintjaraj financoj (ni memoru, ke la financa jaro de ESK finiĝas la 31-an de majo). La esenca agado de la pasinta jaro konsistis en la eldonado kaj vendo de la libro *Kristnaskaj Rakontoj el franca Kanado*, de Louis Fréchette, en traduko de Francisko Lorrain kaj Vincent Beaupré. Malgraŭ grava individua donaco, sen kio apenaŭ eblus konsideri tiun pliriĉigon de la Esperanta literaturo, la neceso doni al la libro akcepteblan prezon, la alta kosto de la grafika

prilaboro — ja estas en ĝi tre belaj ilustraĵoj — kaj la neceso donaci plurajn ekzemplerojn por recenzado kaj aliaj similaj celoj, igis la tutan aferon tre malprofita.

Kvankam la financa situacio de la Esperanto-Societo Kebekia neniel estas zorgiga — ĝi ja havas netan havaĵon je pli ol 6000 \$ kaj eĉ pli ol tio en mono —, la fina rezulto estis malprofito je pli ol 1000 \$.

Donacoj ĉiam bovenas, des pli ke ni ne plu petas regulan kotizon. Vi povas donaci rete per kreditkarto :

esperanto.qc.ca/eo/don



Kelkaj el la lastaj libroj eldonitaj de ESK (*Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado*, *30 Jaro da Agado*) kaj kun granda kontribuo de ESK (*La Eta Princo*)

Dua AMO-seminario dementis mitojn kaj ekskizis inform-strategion por vasta kontinento

Mark Fettes

Grâce à l'initiative de l'Association mondiale d'espéranto, en 2014 partout dans le monde a eu lieu une série des séminaires éducatifs pour les espérantophones. Le deuxième séminaire de cette série s'est tenu ce juillet en Colombie-Britannique et il a attiré une trentaine de personnes du Canada, des États-Unis et quelques autres pays.

La 9-an kaj 10-an de julio trideko da aktivuloj el Kanado kaj Usono, plus vizitantoj el Aŭstralio, Ĉinio, Japanio kaj Tajvano, partoprenis dutagan Seminarion por Aktivula Maturigo (AMO) en la marborda urbeto Sidnejo (Brita Kolumbio, Kanado). La seminario traktis la temon Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Nord-Ameriko sub la gvido de d-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA.

En la programo estis pluraj prezentoj kaj diskutsesioj por la plena seminario, kaj diversaj laborgrupoj pri specifaj temoj, celgrupoj kaj agmetodoj. La varia ritmo kaj enhavo de la sesioj sukcesis teni la atenton de la partoprenantoj kaj kondukis al viglaj kaj foje profundaj interŝanĝoj de ideoj. Fine de la seminario naskiĝis kvar

laborgrupoj : pri evoluigo de teknikaj rimedoj, utiligo de sociaj retoj, respondado al tiklaj demandoj, kaj la enkadrigo de la informa laboro en la pli vastaj streboj al daŭripova evoluo. Ĉiu grupo celas plukonstrui sur ideoj kaj diskutoj el la seminario por pretigi konkretajn konsilarojn kaj informrimedojn en la venontaj monatoj.

En prezento, kiu malfermis la seminarion, Fettes atentigis, ke informado estas pli efika, kiam ĝi tuŝas la sentojn/emociojn de la homoj. Kvankam oni ne neglektu raciajn argumentojn por Esperanto, pli prioritata estas la komunikado de kernaj valoroj — ekzemple, ke esperantistoj estas malfermitaj, inkluzivemaj, scivolemaj, kleriĝemaj, kun alta sento de persona respondeco. Li resumis esplorojn pri valororientiĝoj en Usono kaj Kanado,

montrante la kompleksecon de la situacio, sed emfazante, ke kreskas konscio kaj akceptemo pri la multlingveco de la mondo. Laŭ li, la informado pri Esperanto klare metu ĝin en tiun kuntekston — do montru, ke esperantistoj mem estas multlingvaj, multspecaj homoj kiuj komprenas kaj ŝatas la homan diversecon.

En plia pensiga kontribuo Grant Goodall dementis kelkajn ŝatatajn mitojn de nia movado. Laŭ li, la nuntempa lingvoinstruado estas grandparte sufiĉe sukcesa, almenaŭ kiam haveblas trejnitaj instruistoj, kaj la nereguleco de lingvoj ne donas tiel grandajn problemojn por la lernado, kiel esperantistoj emas imagi.

Kvankam usonaj lingvoinstruistoj dividas kelkajn el niaj kritikoj pri la troregado de la angla, multaj el ili vidas simile grandan problemon en la disvastiĝo de la hispana kiel « dua lingvo por ĉiuj » en usonaj lernejoj. Tiel necesas en kontaktoj kun lingvoinstruistoj emfazi nian konvinkon, ke ĉiuj lingvoj estas instruindaj kaj lernindaj. Goodall ankaŭ esprimis skeptikon pri la argumentoj pri la propedeŭtika valoro de

Esperanto, kvankam li agnoskis, ke indas fari pliajn esplorojn pri ĝi.

Laborgrupo pri ĵurnalista intervjuado kondukis al plia laborgrupo pri la « plej tiklaj » demandoj, kiujn oni devas foje respondi pri Esperanto.

Paralele, laborgrupoj pri sociaj retoj kaj la kreado de aŭdvidaj inform-materialoj (videoj k. a.) kreis bonan bazon por posta laborgrupo pri la celgrupo « universitataj studentoj. » Tiujn laborojn gvidis Mark Fettes, Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis, Derek Roff, Chuck Mays kaj Nicholas Woods (« Nikvo »), kun kontribuoj de multaj seminarianoj.

Kelkajn el la ideoj de Fettes esploris kaj pluevoluigis plia laborgrupo sub gvido de Tamara Anna Koziej. Dum diskuto pri kernaj valoroj, la grupo konstatis, ke necesus reipensi la aspekton kaj enhavon de la bazaj informiloj kaj retpaĝoj de la nordamerikaj asocioj por pli bone komuniki tiujn valorojn al ĝenerala publiko. Ekzemple, oni povus kolekti mallongajn personajn atestojn kaj rakontojn pri la kleriga kaj interpersona valoro de Esperanto, de



Mark Fettes gvidis laborgrupon

homoj el diversaj aĝoj, regionoj, etnecoj, ktp, por vive ilustru la buntecon kaj inkluzivecon de la movado. Poste la sama grupo traktis la koncepton de daŭripova evoluo, konstatante la bezonojn de bazaj informiloj, kiuj koncize kaj en simpla lingvaĵo klarigas la rilaton inter socia/ekonomia evoluo, naturo, kulturo, lingvoj kaj Esperanto.

En diskuto pri celgrupoj, evidentiĝis, ke ni ne scias sufiĉe pri la fonoj, motivoj, interesoj kaj kapabloj de la nordamerikanoj kiuj interesiĝas pri Esperanto. Tial naskiĝis projekto de enketo inter pluraj grupoj — membroj, informpetantoj, lernu-uzantoj, NASK-studentoj — por kolekti kaj analizi tiajn informojn. Kun subteno de la estraroj de Esperanto-USA kaj Kanada E-Asocio, kaj fakaj konsiloj de Ĵenja Amis (magistra studento pri merkato), malgranda teamo realigos tiun projekton en la venontaj monatoj. Se tio montriĝos utila, oni proponos ĝin kiel modelon por aliaj landaj asocioj.

Multaj kontribuoj estis filmitaj de Chuck Mays kaj Derek Roff, kaj daŭras kolektado kaj redaktado de la diversaj tekstoj kaj prezentoj kiuj naskiĝis antaŭ kaj dum la seminario. Tiel AMO-2 alportas pliajn riĉaĵojn al la rikolto el AMO-1. Baldaŭ pretiĝos komuna retejo por kolekti kaj disponigi tiujn diversajn materialojn.

La artikolo unue aperis en La Balta Ondo (sezonoj.ru/2014/07/amo)

Helpu ŝanĝi la mondon !

« Ĉu vi pensas, ke unu persono povas ŝanĝi la mondon? » Mi esperas, ke vi, same kiel mi, pensas ke jes. Tra la historio de la homaro, estis ofte ke unuopaj personoj — sciencistoj, verkistoj, politikistoj — ŝanĝis kiel ni pensas kaj vivas.

Ankaŭ kun Esperanto okazis simile, kaj ni pensas, ke la kresko de nur unu parolanto de la lingvo — Zamenhof — al nia tutmonda komunumo estas grandega sukceso. Ni ankaŭ memoru, ke se Zamenhof kreis la lingvon, estas la esperantistoj kiuj kreis — kaj daŭre kreas — Esperantujojn... Pensu pri la multegaj personoj kiuj pli modeste, sed tamen ŝlosile helpis kreskigi la movadon. Pensu pri Adreo Cseh, kiu revolucie modernigis Esperanto-instruadon, aŭ pri Cathy Schulze, kiu inspiris pli ol du generaciojn de esperantistoj en Nord-Ameriko...

La subtenantoj de ESF agas simile : ili estas pasiaj pri Esperanto kaj helpas al nia fondaĵo dum pli ol 45 jaroj antaŭenigi diversajn projektojn pri Esperanto kaj lingva justeco tutmonde (la AMO-seminario estis, interalie, sponsorita de ESF). Se vi ankoraŭ ne donacis al ESF ĉi-jare, ni petas vin konsideri subteni ESF-on ĉu per unufoja aŭ monata donaco. Vi povas donaci rete: esperantic.org/donacoj aŭ per UEA-konto (esfo-p). Koran dankon !

[laŭ komunikoj de ESF]



AMU Poznanon !



Jenja Amis

L'Université Adam Mickiewicz en Pologne, la seule université dans le monde qui enseigne l'interlinguistique et l'espérantologie en espéranto, vous invite à participer en campagne

« AMU Poznanon » : « Aimez Poznan »

« Tiu kurso montris al ni ke Esperanto estas fenomeno multe pli riĉa ol ni povis imagi », diras Ivan Colling, el Brazilo. Esperantisto de 27 jaroj kaj docento pri inĝenier-arto de universitato de Paranao, li venis duonvojon ĉirkaŭ terglobo al Poznano, Pollando, por studi interlingvistikon, kun sia edzino, kaj post la studoj li planas daŭre labori pri Esperanto universitatnivele kaj eble doktoriĝi pri Esperanto en Poznano.

Ivan estas unu el multaj diplomitoj pri Interlingvistiko kaj Esperantologio : programo, kiu ekzistas jam 16 jarojn (ekde 1998) kaj kiun ofertas unu el la plej grandaj kaj prestiĝaj polaj universitato : la universitato Adam Mickiewicz (UAM, aŭ AMU). « Amu tiun ĉi universitaton ! Ĝi estas unika, ĉar ĝi proponas interlingvistikajn studojn, pri kio ne povas fanfaroni multaj aliaj landoj », diras la gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, Ilona Koutny, farante aludon al la

Esperanta mallongigo : AMU. Amo kaj pasio al Esperanto kaj interlingvistiko, same kiel laboremo kaj sindediĉo, estas ankaŭ tio, kio kunigas en Poznano tiun grupon el pli ol dudek homoj de diversaj profesioj kaj aĝoj, kiuj venis al Poznano de tiom malproksimaj landoj kiel Svedio kaj Brazilo, Usono kaj Irano, Rusio kaj Kroatio. « Nur en tiu programo eblas klerigi niajn aktivulojn ĝis la grado, kiun oni povus atendi de la homoj de 21-a jarcento, kiuj ambicias ŝanĝi la mondon », diras UEA-prezidanto kaj ESF-estrarano Mark Fettes, kiu subtenas la klopodojn de Ilona kaj ŝia teamo ekde ĝia komenco, eĉ se Marko iom bedaŭras, ke en la tuta mondo ne estas aliaj similaj programoj.

En bela kaj antikva urbo, Poznan, la studentoj havas vere unikan ŝancon ricevi kompleksan edukon pri planlingvoj kaj interkultura komunikado, kompareblan al filologiaj studoj de aliaj lingvoj, diras Ilona Koutny : « Kadre de

interlingvistiko ni studas naciajn, etnajn lingvojn, kaj ankaŭ internaciajn planlingvojn, kiuj volis solvi la problemon de internacia komunikado.

Kompreneble, la studoj fokusiĝas al la plej disvastiĝinta planlingvo, Esperanto : literaturo, lingvistiko, historio kaj diversaj praktikaj flankoj de la lingvo ». Kvankam la plejparton de laboro la studentoj faras distance, oni devas veni kaj persone ĉeesti la universitatan sesion du-foje jare : en februaro kaj septembro : jen nemaltrfinda ŝanco persone konatiĝi kaj amikiĝi kun aliaj studentoj kaj profesoroj... sed tio aldonas la neceson pagi la vojaĝkostojn du-foje jare : entute, sesfoje dum tri jaroj... Do, eĉ se la studkostoj ne tro altas (460 eŭroj por A-landoj kaj 175 eŭroj por B-landoj semestre), por studentoj de foraj landoj, ekzemple, Brazilo, la ĉefa elspezo fariĝas la kosto de la aviadilbileto : ofte, pli ol mil eŭroj por unu vojaĝo...

ESF — la fondaĵo, kiu strebas (inter aliaj celoj) altigi akademian nivelon de Esperanto kaj ĝian

prestigon en universitatoj, jam de jaroj finance subtenas tiun bonegan programon, kaj ĉi-jare ĝi planas donaci pli ol antaŭe... kaj instigi aliajn esperantistojn fari la samon. Aldone al la ĉi-jara kaj la venontjara planita subvencio de 5000 \$, ESF lanĉas specialan donacprogramon « AMU Poznanon » : por ĉiu eŭro (dolaro, eno, realo, ktp.) donacita de esperantistoj al la Interlingvistikaj



Instruista kaj studenta grupoj kun Ilona Koutny, Stefan MacGill, István Ertl kaj Katalin Kováts.

Studoj en Poznano, ESF aldonos *samvaloran donacon*, tiel ke la komune kolektita sumo atingu 5000 \$! Do, se vi donacos 10 eŭrojn kadre de tiu ĉi kampanjo, ESF donacos pliajn 10 eŭrojn, kaj se vi donacos 100 eŭrojn, ESF aldonos 100 pliajn eŭrojn al la programo, ktp. Do, anstataŭ la planitaj 5000 \$ nur de ESF, la programo povas ricevi *aldonajn* 5000 \$ pere de VIA donaco, duobligita de ESF. Tiel, via donaco al la kampanjo « Amu Poznanon », helpas subteni tiun unikan

programon per 10 000 \$, entute, en 2015 ! Tiu mono helpas al esperantistoj, kiuj bezonas tian helpon, pagi la studkostojn kaj vojaĝkostojn, ja

por kelkaj el ili la flugdistanco estas pli ol 10 mil kilometroj !

Vi povas donaci rete (esperantic.org/amu) aŭ per UEA-konto : esfo-p (donacante per UEA, nepre menciu « por AMU Poznanon », kaj samtempe sciigu al admin@esperantic.org pri la farita

donaco) — en ambaŭ kazoj ESF faros egalkvantan donacon. Interlingvistikaj Studoj kaj ESF esperas je via partopreno kaj via malavareco... duobligita !

Pli pri Interlingvistikaj Studoj en Poznano ĉe amu.edu.pl/~interl

Unue aperis en la oktobra numero de revuo Esperanto.

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado : papere kaj baldaŭ elektronike !

Ĝus aperis la nova eldono de *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado* : ses kristnaskaj rakontoj de Louis Fréchette [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19-a jarcento. Li aperigis ilin en 1899–1900, en versioj anglalingva kaj franclingva, ambaŭ de li mem verkitaj, kun la celo konigi la franckanadan kulturon al la ekstera mondo.

Li studis juron, sed poste aktivis ĉefe kiel ĵurnalisto kaj verkisto. Li estis, laŭ la tiamaj normoj, sufiĉe progresema homo. Krom siaj multnombraj gazetartikoloj, li multe publikigis, en diversaj ĝenroj : ĉefe poezion, sed



ankaŭ teatraĵojn, rakontojn k.a.

La libro havas 130 paĝojn, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo Frederick Simpson COBURN (1871–1960).

Mendu vian paperan ekzempleron ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe ESK — kaj ĝuu elstarajn verkojn kaj altekvalitan libron dum tiu ĉi Kristnaska sezono! La kosto de la libro ĉe ESK estas 20 \$ + sendokostoj (mendu ĉe francisko.lorrain

(ĉe mac.com). Elektronika ekzemplero estos baldaŭ vendebla per FEL (retbutiko.net), Esperanto-USA (esperanto-usa.org) kaj ESK (esperanto.qc.ca).



Esperanto-renkontiĝoj



16-18-a de majo 2015: 12-a MEKARO	Toronto, Ontario
17-a — 25-a de julio 2015 : 48-a konferenco de ILEI	Oostende, Belgio
25-a de julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK	Lille, Francio
2-a — 8-a de aŭgusto 2015 : 71-a IJK	Wiesbaden, Germanio
21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO	Granby, Kebekio

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo 31-a de oktobro 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 14-a de novembro 2014, 18 h*	Resto Végo (sube)
Vendredo 28-a de novembro 2014, 19:30 h	MEDO
Sabato 13-a de decembro 2014, 18 h*	Jarfina festo kaj LASTA kunveno en MEDO ! Alportu ion ! Anoncu vin al normandfleury@esperanto.qc.ca

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Por temaj vesperoj kun manĝoj vi povas alporti ion kaj veni je la 18 h aŭ vi povas veni simple por babili je la 19:30 h.

Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien) : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).
MEDO (Montreala Esperanto-Domo) : 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2014.11.20

3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca



En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca



Vizitu nian retejon !

Visitez notre site web !

www.esperanto.qc.ca



Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti
Ĵenja-n Amis
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

